
Turanĝo 31 Luko

3-a trimestro 2013



En tiu numero vi legos..

Gemeliĝo de la esperantistaj grupoj de Braŝovo kaj Turo

Okaze de la prelegturneo de Rodica Todor inter la 14a kaj la 17a de Marto 2012, ni sciigis al ŝi ke la urbo Turo estas ĝemelita kun ŝia urbo Braŝovo. Ni interkonsentis por estigi rilatojn inter la du esperantistaj grupoj. Rodica prelegis en Turo por prezenti sian landon.



Ŝi ankaŭ proponis al la membroj de nia grupo partopreni en la vojaĝo, kiun ŝi estis organizanta por malkovrigi Rumanion : vizito de Bukareŝto, ekskurso en delto de Danubo, vizito de Braŝovo kaj de ĝia ĉirkaŭaĵo. Tiu vojaĝo okazos inter la 27a de majo kaj la 7a de Junio 2013.

La unua parto de la ĝemeliĝo estis la akceptado en Turo de grupo de Braŝovaj esperantistinoj okaze de sia vojaĝo al nia lando. Ili vizitis Turon inter la 29a de Aprilo kaj la 4a de Majo 2013. 7 esperantistoj el Turo aliĝis al la vojaĝo en Rumanio, tiuj personoj konsentis gastigi Rodica-n kaj siajn kunvojaĝantinojn.

Marisol kaj Jean-Louis rilatis kun la respondeculino pri la internaciaj rilatoj de la urbodomo de Turo kaj kun tiu de la "Domo de Eŭropo" en Turo por aranĝi akcepton en la du lokoj.

La grupo rezervis taksion por veturi la Rumaninojn de la flughaveno de Beauvais [bove] ĝis Turo. Jean-Louis akceptis niajn amikinojn en la flughaveno kaj aranĝis ilian gastigadon dum la revenvojaĝo al Turo. Posttagmeze, Rodica Todor kaj ŝiaj 6 esperantistaj lernantinoj alvenis ĉe D. et J-L. Le Brizault.



Post tagmanĝo ĉe Denise kaj Jean-Louis, niaj rumanaj amikinoj kaj la turanĝiaj esperantistoj, kiuj venis

Numero unuaTema



bonvenigi ilin, estis akceptitaj de S-ino Amirault, kiu ĉiĉeronis ilin en la urbodomo de Tours. La letero de la urbestro de Braŝovo por S-ro Jean Germain, lia samrangulo, estis donita al S-ino Brunet, kiu reprezentis



la municipon de Tours. La akcepto finiĝis per honora vino kaj donacetoj al niaj rumanaj amikinoj. Post pieda reiro ĉe D. et J-L. Le Brizault, la Rumaninoj instaliĝis ĉe siaj gastigantoj.

Mardon la 30an, la Rumaninoj kaj iliaj akompanantoj vizitis unue la kastelon de Langeais, sed necesis nuligi la ŝippromenadon sur la Luaro el Langeais pro la malbela vetero kaj la pikniko okazis en la domo de C. Mauboussin en Vallères. Posttagmeze ni vizitis la kastelon de Azay-Le-Rideau. Je la 18a, la prelego de R. Todor pri Rumanio kaj Braŝovo, en la Domo de Eŭropo havis sukceson (ĉirkaŭ 50 personoj partoprenis).

Spite la malbela vetero de la **1a de Majo**, niaj amikinoj malkovris Vouvray-n, la kelon de la vinkultivistoj en "Vallée Coquette" kaj la bienon de S-ro Pinon en "Vallée de Cousse". Li varme akceptis nin.

Jaŭdon, la 2an, ni vizitis la historian parton de Turo : Belarta Muzeo, katedralo,





strato Colbert, placo Plumereau, Haloj, Baziliko kaj Muzeo de la metikompanismo. Tiu-ĉi kaj la Belarta Muzeo estis aparte ŝatataj. Vespere en La Haloj ni vespermanĝis kune ; kantoj kaj dancoj de la du landoj ĝojigis ĉiujn.

Vendredon la 3an, ni vizitis Chenonceau matene kaj piknikis surloke. Posttagmeze ni vizitis



"Clos Lucé" kaj promenis en Amboise. Revenante, ni haltis en Rochecorbon por vidi la trogloditajn domojn kaj la Lanternon. Ni kuniĝis por adiaŭa vespermanĝo en la «Tonnelle», place Paul Bert (26 partoprenantoj en festa etoso !).

Sabaton, la 4an, niaj rumanaj amikinoj foriris el St Pierre por atingi Artigues okaze de la Internacia kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj.

La dua etapo okazis en Braŝovo dum la vojaĝo

"Ekkonu Rumanion..."



EKKONU RUMANION

7 esperantistoj el Turo partoprenis : Denise, Jean-Louis, Jane, Caroline, Hélène, Marie-France kaj mi.

Taksie ni iris al la flughaveno de Roissy . Ni flugis al Bukareŝto, kiun ni atingis lundon la 27an de Majo je la 16a15. 11 francaj esperantistoj el aliaj regionoj vojaĝis kun ni. Rodica atendis nin en la flughaveno. Buse ni atingis la stacidomon proksime al nia hotelo "Hello". Post instalado ni serĉis restoracion por vespermanĝi, sed trovis nur butikon, en kiu ni aĉetis preparitajn pladojn. Vespere Rodica prezentis al ni la programon de la vojaĝo.



Mardon matene per metroo ni atingis la Placon de Universitato, poste ni piediris ĝis la monaĥejo Stavropoleos, ni haltis an-





taŭ la malnova reĝejo kaj vizitis la gigantan Palacon de la Parlamento.


Ni vizitis etan parton de la interno de tiu grandega konstruaĵo. Ĝia surfaco ampleksas 350 000 kvadratajn metrojn. Ĝi estas la dua el la pli vastaj mondaj monumentoj. Ĝi estas



La malnova reĝejo



270 m longa, 240 m larĝa kaj 86 m alta. Ĝi entenas 1 100 salonojn. La deputitoj kaj la senatanoj sieĝas en tiu palaco. Por lasi lokon al tiu konstruaĵo necesis malkonstrui 7000 domojn kaj 30 preĝejojn. La interno estas luksa, kovrita el rumana marmoro. Ĉiuj necesaj varoj originas el Rumanio.







La tuta grupo sur la balkono de la Palaco

Poste Rodica kondukis nin en tre belan restoracion nomitan "Caru cu bere", kie ni tre bone manĝis dum muzikistoj ludis.



Posttagmeze, parto de la vizito temis pri la revolucio de 1989, kiu kaŭzis morton aŭ vundojn al multaj junuloj en Bukareŝto.



Monumento memore al tiuj (ĉefe junuloj), kiuj mortis pro la revolucio de 1989.

Merkredon ni veturis per buso luita de Rodica. Matene, ni iris viziti la palacon Cotroceni, eksa palaco de la Rumanaj reĝoj. (Ni aplaŭdis la ŝoforon, kiu lerte retroveturis en mallarĝaj stratoj).



Ĝardena fasado

Norde de la urbo, ĉe aliro al la granda parko Herastrau staras la statuo de Charles de Gaulle. Ni piediris en la aleoj ĝis alloga restoracio rande de vasta lago.

Dank'al la bela vetero ni agrable vizitis la "Muzeon de la Vilaĝo", 12 hektarojn vastan. Ĝi entenas



kamparajn domojn translokigitajn el diversaj regionoj de Rumanio. Interne ni povas vidi meblojn, ilojn, teksaĵojn. Vidindas ankaŭ tri lignaj preĝejoj, kies tegmentoj estas kovritaj per tre malgrandaj lignaj "tegoloj".





Vespere la turanoj denove vespermanĝis en la eta restoracio proksime al la "Gara de nord".

Ĵaŭdon matene, per buso ni atingis Tulcea-n. Du hotelŝipoj atendis nian grupon. Ni intaliĝis en niajn kajutojn kaj venis en la manĝoĉambron por aperitivo kaj prezentado de la vizito de la delto de Danubo dum la ŝipoj jam antaŭeniris, tiritaj de unu trenŝipo. Dum la tuta



krozado la kuiristino preparis por ni pladojn el diversaj fiŝaĵoj. Ni povis sunumi sur la supra ferdeko, sed malfeliĉe la suno kelkfoje paneis. Per binokloj ni observis birdojn. Hélène multe helpis nin por identigi multajn el ili...





Ĉar la hotelŝipoj ne povis enŝoviĝi tra la mallarĝaj brakoj de Danubo, plurfoje ŝipeto veturis nin ĝis trankvilaj lokoj, kie eblis observi birdojn : kormoranojn, cignojn, plataleojn, egretardeojn, ralardeojn, ktp….

Ni ankaŭ uzis la ŝipeton por atingi la vilaĝon Mila 23 sur la riverbordo. Ĝi estas loĝata de Lipovenoj, rusdevenaj, antikvaj ortodoksoj, kiuj rifuzis en 1650-1660 religian reformon de la patriarko Nikono kaj de la caro Aleksej Mihajlovic. Instruistino akceptis nin en sia klaso sed plejparto el la lernejanoj estis for por partopreni en "tago de la infanoj" en alia vilaĝo.



Ni spertis unikan okazon foti efemerojn. *Ili estas senbuŝaj insektoj, kiuj ne kapablas sin nutri kaj vivas nur kelkajn horojn, maksimume 1 tagon. Ilian kurtan vivon plenigas la kopulacio kaj demeto de ovoj. La eloviĝantaj larvoj vivas ĝis plena evoluo raban vivmetodon. Ilia evolua stado komenciĝas per la akvo-kutimiĝinta larvo, kiun sekvas iu transira "subimago"-formo kaj per nova elhaŭtiĝo aperas la preta insekto (imagino). Ili flugas 1-2 km kontraŭ fluo de la rivero kaj tiam demetas ovojn en la akvon. Tiel la ovoj adheriĝas ĉe la sama loko, kie ekflugis la efemero. La evoluo de efemero el ovo daŭras 3 jarojn, poste la efemero vivas kelkajn horojn.* (laŭ Vikipedio)



Noktardeo sin regalante per efemeroj

Vespere, Corentin, nia rivera ĉiĉerono, kondukis nin ĝis dormejo de kormoranoj. Tiuj birdoj grupiĝas sur arbojn, kiujn ili mortigas per sia fekaĵo. Reirante al nia hotelŝipo, ni povis admiri sunsubiron



Dimanĉon matene ni revenis al Tulcea. Per "nia" buso ni iris al Braŝovo post halto en Mamaia ĉe la Nigra Maro. Spite la malbela vetero, kelkaj kuraĝuloj banis siajn piedojn.



Ni tagmanĝis en kelo-restoracio en Murfatlar. Tie ni gustumis plurajn specojn da vino produktita el la vasta apuda vitejo. La nokto jam instaliĝis, kiam ni alvenis al nia hotelo en Braŝovo.



RESTADO EN BRAŜOVO



Lundon matene ni piediris al la urbodomo por renkonti la urbestron, sed li neniam aperis. Nur la urba delegitino pri ĝemeliĝo akceptis nin. Per buso ni veturis al Sembata de Jos por la vizito de ĉevalbredejo de la raso lipico.



Unue ni vidis la ĉevalojn en stalfakoj de la ĉevalejo, poste ni iris ĝis herbejo, kie troviĝis ĉevalaro.



En montara restoracio, tre allogaj lokalaj specialaĵoj atendis nin.

Ni vizitis la monaĥejon Brancoveanu, ĝi ŝajnas tute nova kvankam ĝi estis fondata en 1696.



Elbusiĝante proksime al la kastelo de Braŝovo, ni havis la surprizon renkonti niajn Rumanajn korespondantinojn. Ni kune vizitis



la konstruaĵon, poste ili invitis la turanĝianojn sidi en la kastelan restoracion. Ili ne nur mendis vespermanĝon sed ankaŭ muzikistojn, dancistinojn kaj kantistinojn. Ni ĝuis tre belan spektaklon dum ni gustumis bongustajn pladojn.







Mardon matene ni piediris ĉirkaŭ la urbaj fortikaĵoj. Rodica kondukis nin en la bastionon de la teksistoj, en





liceon, kie la jara renkonto de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto Konferencoj) okazos venontjare kaj en malnovan kvartalon. Televidĵurnalistoj, menditaj de Rodica, interviuvis kelkajn esperantistojn antaŭ la pordo de hungara lernejo (10% el la Braŝovanoj estas Hungaroj).






Posttagmeze ni vizitis la kastelon de Bran. Ĝia famo ligiĝas al la legendo de la Grafo Drakulo, kvankam neniu historia dokumento





atestas pri lia ĉeesto tie. Multaj komercistoj havas budon proksime al la kastela enirejo por vendi memoraĵojn, kiuj ĉefe temas pri Drakulo. Post halto en Raŝnov kaj antaŭ ligno-kovrita preĝejo, vespere, ni retrovis la membrojn de "Amikeco Braŝovo", kiuj akceptis la tutan grupon en trin-





kejo.

La merkreda ekskurso kondukis nin al Sibiu. Dank'al sia arkitektura heredaĵo ĝi estas pritaksata kiel unu el la plej belaj kaj bone konservitaj historiaj urboj el Rumanio kaj Eŭropo. La mezepoka fortikaĵo de la urbo restis nedetruita en la du mondmilitoj, kaj gardas ankoraŭ



la spiriton kaj la etoson de la pasintaj jarcentoj.

Sibiu famas pro la "okuloj" sur siaj tegmentoj. Ni haltis antaŭ ŝildo, grava por la esperantistoj.









La tagmanĝo okazis en restoracio, meze de kamparana muzeo.

Posttagmeze la buso kondukis nin al Sigiŝoara, mi fotis tra ĝia fenestro…





Vlad la dua, la Drako, princo de Valakio instaliĝis en Sigiŝoara en 1421. Li restos tie ĝis 1436. Lia filo naskiĝis tie, li regos kiel Vlad la IIIa "la palisumanto". Lian legendon uzos la verkisto Bram Stoker por imagi la faman Drakulo-n.



Dum pluraj jarcentoj, la urbo havis strategian kaj komercan rolon ĉe la okcidenta limo



de la hungara reĝlando, ĝi iĝis unu el la plej potencaj urboj el transilvanio.





Vespere niaj Rumanaj amikininoj atendis nin en restoracio proksime al Braŝovo. Tie ni manĝis bongustan fiŝaĵon. Ni ĝisrevidis unu la alian.



Jaŭde matene ni vizitis la fortresopreĝejon de Preĵmer. En la fortikaĵo, kiu protektas la preĝejon, troviĝas ĉambroj, kie la vilaĝanoj povis rezisti al invadantoj. Ili instalis tie metiejojn kaj lernejon.









En Sinaia, ni eniris la monaĥejon.

Plian fojon, ni tre bone tagmanĝis en restoracio.

Vere Rodica scias elekti la agrablajn lokojn, kie la manĝaĵo estas bongusta !





Posttagmeze nivizitis la kastelon de Peleŝ.

Vespere ni atingis Bukareŝton kaj vendrede, aviadile ni revenis hejmen.

Tiu raporto estas nur resumo de nia mirinda vojaĝo. Rodica donis multajn klarigojn, mi faris kaj kolektis multajn fotojn ; la loko mankas en tiuj paĝoj por detale rakonti tiun dektagan vojaĝon. Espereble Rodica Todor denove proponos "Ekkonu Rumanion", ne hezitu , aliĝu !!!

Rodica estas elstara organizantino kaj ĉiĉeronino : ni neniam perdis tempon, ĉiam bonega etoso regis en nia grupo .

Rodica, unu el la "KARAJ" multe dankas vin !!!

Jacques Gaumé

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr